

ESPERANTO EN BELGIO

Respondecas :

A. MERTENS GOOSSENS Achter d'Abdij, 46
B-1720 DILBEEK

Feliĉan Novan Jaron

DANKON AL JAN BOVENDEERD !

Estimataj,

Nian estis proponita al ni la prezidanteco de la Esperanto Federacio, de jam en marto IFO, Jan Bovendeerd esprimis la deziron, ke pro liaj novaj taskoj de Flandra Esperanto ligo, estus preferinde trovi anstataŭantan kiel ĝenerala sekretario de E.F.

Tamen, dum pli ol unu jaro kaj duono, ni tre indone akcentis plenumi ambaŭ taskojn, konsidante pri la malfacileco trovi alian personon por transpreni la laboron.

Ne nur li plenumis ĉiun tre forge la tradicion sekretarian laboron, sed krome li lanĉis "Esperanto en Belgio" kaj redaktis ĝin anstataŭ unu periodoj, kiel la pli grava profesia laboro tiam malfaciligis.

Koran dankon al vi, Jan, pro la laboro farita, pro viaj ideoj - kaj espereble ankoraŭ estantaj - konsiloj ; kaj koreajn kondamnitajn por la daŭrigo de via laboro de E.F.

Vi pravas : ni tamen ni aliĝis, sed ni startis de nova kvalitato kun aliaj formoj .

Marc Montoye .

LA NOVA ĜENERALA SEKRETARIO DE B.E.F.

amike salutas vin kaj estas je la dispono de siaj kolegoj de F.E.L. kaj A.P.E., de ĉiuj esperantistaj organizaĵoj kaj de ĉiuj samideanoj kiuj deziras sendi novaĵojn aŭ nur per mencio, aŭ iom pli detale per teksto.

Vi povas atingi la sekretarion skribe aŭ telefone de la oficejo de B.E.F. Montoyerstrato, 37 B24, 1040 Bruselo telefono (kun aŭtomata surbendigilo) 02/5135995

André MERTENS GOOSSENS.

ANKORAU IOM PRI LA 2-A B.E.F. - KONGRESO ...

La lasta (ne protokola) numero de "Esperanto en Belgio" enhavas impresojn kaj reagojn pri la dua " federacia kongreso " de B.E.F. Tiel ni skribas la nomon, ĉar estas vere, ke ne temas pri kongreso en la plena senco de la vorto, kio en aŭgusto du tagoj estas ja preskaŭ neeble, kaj komparo de UK aŭ IJK eĉ kun tute sukcesanta nacia kongreso ne povas esti favora al la dua .

La unua " federacia kongreso " okazis pasintjare en Lieĝo, kun pli modesta programo unutaga, kiu realiĝis. Ĉi-foje la provizora programo estis sufiĉe alloga, sed anonciĝis nur 13 (ĉu fatala cifero ?) personoj antaŭ la limdato, kaj nur kelkaj poste. Parte pro tio multo de la provizora programo ne okazis.

Krom la kunsidoj, tamen okazis prelego de E-ro Van Stevens (organizita de la Eŭropa Klubo, flandra sekcio), kaj vizito de la Muzeo de Natursciencoj (organizita de la Asocio por la Enkonduko de MBN).

Flanke de (laŭfakte pravaj) negativaj konstatoj, aŭdiĝis ankaŭ sugestoj pri plibonigo, ekzemple per organizado de Beneluxa Kongreso, ĉar tiu formulo laŭdire iam estis tre sukcesplena.

Post Bruselo kaj Lieĝo, estus bona organizi venontjare nian " kongreson " sur pli firmitaj bazoj en flandra urbo, kaj eventuale doni al ĝi transliman karakteron. Propozoj tiurilate estas jam de nun atendataj, por ke oni povu lerni de la pasinteco, kaj proponi ion alian ol nur (tamen necesajn) kunsidojn.

M.M.

ŜILDOĜARANTOJ, KONVOLU REAGI

Ĉiutage pluraj televidaĵoj elsendoj almenaŭ parte estas dediĉitaj al esperanto. Ni certe havos okazaĵojn farigi pliajn ligojn kun la ĉi-jaraj Universala kaj Junulara kongresoj. Ŝajnas ekzemple ke la respondeculoj de la lunda debataĵendo " Ecran-Écran " de la RTBF akceptus pritrakti la problemojn de internacia komunikado. Sed ili post unua esploro ne malkovris filmon, kiu taŭge ilustru la problemaron. Se vi havas ideon pri iu titolo, konvolu sciigi ĝin laŭeble frue al la prezidanto aŭ la sekretario de B.E.F. mallonge pravigante vian elekton . Koran antaŭdankon .

M.M.

 * Gastejo Edmond Privat
 * Foyer
 * Kultura Centro Esperantista
 * Postiers 27 PoŝtOfico 771
 * CH-2501 La Chaux-de-Fonds
 * Tel.: 059 26 74 07
 * Poŝtkonto: 23-2921

ĜENERALAJ INFORMOJ

MODERNA RESTADEJO

GASTEJO EDMOND PRIVAT de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA estas meti je dispono de la karsanoj de INTER-NACIA FERIA MEDITERNEJO, de esperanto-ĉerĉantoj kaj de feriantoj modernan restadejon, kie ili povas eĉ longe resti sen financaj problemoj.

SITUO

GASTEJO EDMOND PRIVAT situas en la montaro GRILSO je 1100 m de alteco, borde de la urbo LA CHAUX-DE-FONDS (37'000 loĝantoj), en ege kvietaj kvartalo. En tuja proksimeco troviĝas vastaj paŝtejoj kaj arbaroj, facile atingeblaj montesuproj, multaj programoj. La skilisto CHAMPEAU RAPIDE, kun sia ludigita ŝaklivo, vintra invitas al ŝiado eĉ nokte. La trolebuso No 6, linio SUCCES, alvenas de la fervoja stacidomo ĝis la rando de la esperanto-kvartalo; petu la haltejon "Esperanto". De tiu haltejo marŝu supren laŭ la trotuaro, turnu ĉe la unua vojo dekstren, marŝu borde de la arbaro 50 metrojn. Tiam vi vidas indikilon pri la vojo "Postiers", kie je la No 27 troviĝas la sekretariejo de la Centro. De la trolebusa haltejo "Esperanto" ĝis la Centro oni marŝas centon da metroj. Lagasnoj troviĝas je tuja proksimo de la Centro, restoracioj ankaŭ ne mankas.

SEM-RESERVADO

La ĉambroj de GASTEJO EDMOND PRIVAT estas unu-, du- aŭ kvar-litaj. La komunna vivo baziĝas sur la principo de la karnestrado. La gastoj nen prizorgas sian litojn, povas pretigi siajn manĝojn kaj nen zorgas pri la pureco de la aĵoj: dormoĉambro, duŝoj kaj lavaboj, kuirejo ktp. Dank' al tio la restadprezoj modernas, kvankam la ĉambroj komfortas.

LITOJ KAJ RESTADKOSTOJ

Muntampe estas je la dispono de la gastoj 18 litoj: 2 en unulitaj ĉambroj (tranoktado: svisaaj frankoj 14.-); 8 en dulitaj ĉambroj (tranoktado: F 9.-) kaj 8 en kvarlitaj ĉambroj (tranoktado: F 6.-). La kostoj inkluzivas hejtadon, duŝon, kuiradon. La gastoj rajtas kunporti siajn litukojojn aŭ dormosakon. Ili povas ankaŭ lricevi litukojojn je la ĉi-sekva tarifo: F 10.- por la unua nokto kaj po F 1.- por la aliaj noktoj de la semajno.

Okaze de aranĝo, eblas ricevi matenmanĝon kontraŭ po F 3.- tage.

Se gaste deziras, ke purigisto prizorgu lian ĉambrojn, li povas tion havi kontraŭ po F 5.- tage. Gaste, kiu ne volis purigiston, sed forlasas la ĉambrojn en malorda stato, pagas F 30.- por la ĝenerala reordigo.

LIT-RESERVADO

Skribe aŭ telefone informiĝu, ĉu la dezirata lito estas libera en la antaŭvidita restad-periodo. Indiku tre eksakte viajn alven- kaj foritagojn. Skribu tre legeble viajn nomajn kaj adresojn.

Se la lito estas luebla, ni petos de vi antaŭpagon por la definitiva rezervado. La respondo akompanos urboplano kaj ĝenerala informilo.

ADRESO

Ĉiujn korespondon direktu al la adreso indikita je la karto de nia informilo.

EL ORIENTO, OKCIDENTEN !

Ne korespondrukabriko sub tiu ĉi titolo, sed jes varma alvoko al tiuj, kiuj volas instigi efektivajn kulturajn interŝanĝojn kun la Socialismaj landoj.

Kiel vi scias, homoj el "Oriento" nur malfacile povas pagi la kotizojn de niaj kongresoj, ĉar la eblecoj ŝanĝi iliajn valutojn en niajn, estas limigitaj kaj komplikaj.

Pro tio la Flandra Esperanto-Junularo proponas du formulojn, kiuj tamen ebligas interŝanĝon inter Okcidento kaj Oriento :

1) Junuloj de okcidentaj landoj, kiuj en '83 volas ĉeesti la Internacian Junularan Kongreson en Hungario, pagu la kongreson de Leuven en '82 por hungara junulo kaj interŝanĝe mem ricevos senpagan kongresrestadon en Hungario. Pagota estu nur la vojaĝo tien, la resto estos aranĝita surloke.

2) Plenkreskuloj povas helpi laŭ la jena maniero : anstataŭ fariĝi Patrono de la Junularkongreso en Leuven, ili pagu la kongreskotizon por junulo el Socialisma lando.

Ni esperas ke ni per tiu ĉi propono povos internaciigi niajn kongresojn sen ke transpagaj problemoj malebligu partoprenon. Pro tio ni petas vian kunhelpon kaj subtenon laŭ viaj eblecoj.

Ni ankaŭ petas al vi ne entrepreni proprajn paŝojn en tiu direkto, por ne ankoraŭ komplikigi aferojn. Ĉiujn informojn pri la projekto vi povas ekhavi ĉe Fleja, Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen. Tel. 031/16.05.05.

VIKTIMOJ EL HIROSIMA KAJ NAGASAKI ALVOKAS AL VIA HELPO !!!!!!!

Por atesti pri la homaj suferoj kaj la gravaj detruoj post la du unuaj atom-bomboj jam surtere lanĉitaj :

- 200.000 subitaj mortintoj ! -
- amasoj da ruinoj ! -
- blinda brulofero ! -

pere de la japanaj esperantistoj, la restantaj viktimoj, vunditaj kaj kriplitaj celas nur sciigi pri tiuj eventoj al la plej multnombraj homoj el la tuta mondo ! Ili bezonas vian helpon !

Cu tion oni aŭdacus rifuzi ?

Ni opinias : NE !

Pro tio, ni pozitive respondis al ilia alvoko.

Nun japanaj viktimoj kaj samideanoj anoncas al ni la alvenon, komence de februaro, de nombraj bildegaj atestiloj !

Ekspozici-panelojn ni havos, kies

56 je 95 cm x 50 cm

75 je 55 cm x 45 cm

19 je 60 cm x 50 cm.

Dum proksimaj februaro kaj marto, nia devo estos plej larĝskale vidigadi tiun gravan materialon !

Pro tio, ni atendas rapidajn proponojn de ĉiu ajn, koncerne lokojn, salonojn kaj datojn por ekspozicii !

Kion vi kapablas ?

Tion, ni esperas baldaŭ sciigi al niaj japanaj samideanoj, laŭ viaj iniciatoj !

Jam de nun, sendu viajn proponojn por ordigi elmontrokalendaron al la Sekretariejo de la Asocio Por Esperanto, Clément THOLET, 54, rue des Hineux 4400 Herstal (tel. 041/640271).

Antaŭtempe tutkoran dankon.

Lambertine DREZE.

Prezidantino

Clément THOLET.

Sekretario.

LA SEKRETARIO DE B.E.F.

dankas ĉiun samideanon kaj amikon kiu adresis al li bondezirojn, kuraĝigojn, konsilojn aŭ informojn helpe al lia enoficiĝo.

Rimarkoj kaj sugestoj, ricevitaj koncerne la bultenon aŭ la organigramon, estas ekzamenatoj kunlabore kun spertaj membroj de la estraro.

Notu - kaj renotu - ke ĉiu informo, povanta interesi E - ajn asociojn, grupojn aŭ komitatojn en la lando, estas bonvena ĉe la sekretario, Montoyerstrato, 37 b.24/1040 Bruselo tel (02) 513.59.95, por ebla publikigo.

Tutpretaj tajpitaj tekstoj gajnigas tempon kaj monon, kaj feliĝigas la sekretariojn.

A-MG

NOVA ADRESO

Universala Esperanto-Asocio, Grafika Centro
Flandra Esperanto-Ligo
Flandra Esperanto Junulara Asocio
Esperanto-grupo "La Verda Stelo"

komunikas al vi sian novan adreson :

Frankrijklei 140

B-2000 ANTWERPEN tel.(031) 34.34.00

POR EKSPozICIOJ

ESPERANTO-CENTRO en Antverpeno disponas, ne nur pri taŭga ekspozici-materiale, sed ankaŭ pri fakulo, kiu povas doni la necesajn konsilojn ktp.

Ne hezitu do peti informojn al la ESPERANTO-CENTRO,
Frankrijklei, 140 B-2000 ANTWERPEN tel.(031) 34.34.00

ELKORAJN GRATULOJN

al la Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo"
okaze de ĝia 75 jara ekzisto ...
kaj al ĝia re-nova (ĉiam boligenta) prezidanto
Ivo Durwael.

A-MG

ALVOKO ! POR AGI EN UNIVERSITATAJ MEDIOJ

Cu iu Esperantantisto konsentas okupiĝi pri kolekto kaj listigo de ĉiuj universitataj tezoj verkitaĵoj en la mondo por akiri la titolon de doktoro aŭ licenciato ?

Tiu listo estas unu el la multaj dokumentoj kaj inventaroj kiujn bezonas nia movado por agi en universitataj medioj.
Informojn tiurilate interesitoj povas peti ĉe :

Germain PIRLOT, Kemmelbergstraat 5, b.3,
8400 Oostende tel. (059) 70.87.00

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131/A,
2180 Kalmthout tel. (031) 66.62.66

SEMINARIO PRI INFORMADO

Tiun internacian seminarion kunvokis Sro E. Symoens kaj partoprenis, de la 16a ĝis la 18a de oktobro 1981, pluraj el niaj samlandanoj, i.a., Sro G. Maertens.

Ĝia raporto estas interesa labordokumento por aktivuloj, videbla ĉe la sekretario de B.E.F. en Bruselo, aŭ mendebla ĉe la Centra Oficejo de U.E.A. en Roterdamo kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj aŭ 4 guldenoj.

A-MG

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

42-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, organizita de Hispana Esperanto-Federacio (H.E.F.) - ĝi okazos en la andaluza urbo MALAGA de la 16-a ĝis la 22-a de Julio 1.982-a (Adreso de la Organiza Komitato : Poŝtkesto 354 MALAGA).

SEMINARIO PRI LA SPORTO - Profitante la okazigon, venontjare, en Hispanujo de la Tutmonda Futbala Campioneo, Madrida Esperanto-Liceo (Atocha, 98 4e MADRID-12) aranĝas kun la aŭspicio de la Hispana Esperanto Federacio (H.E.F.) seminarion en la internacia lingvo sub la titolo "Seminario pri la Sporto en la Moderna Socio".

La menciita Seminario okazos en Madrid de la 6-a ĝis la 13-a de Julio 1.982-a.

ESPERANTO EN LA RADIO - Okaze de la vizito al Valladolid, nuna sidejo de H.E.F., de S-ino Ada Fighiera-Sikorska ni, kaptis la eventon por informi al la tuta loĝantaro pri la Internacia Lingvo ESPERANTO. La 17-an de Novembro, S-ino Urueña, Prezidantino de H.E.F., kaj S-ino Fighiera-Sikorska estis intervjuataj per la lokaj radiostacioj RADIO VALLADOLID kaj RADIO POPULAR, la intervjuoj daŭris 45 minutoj kaj 30 minutoj respektive. La sekvan tagon S-ino Fighiera-Sikorska akompanata de S-ro López Nalda, gvidanto de la Elementa Kurso de Esperanto en la Grupo "Fido kaj Espero" de Valladolid estis intervjuata dum dek minutoj per LA VOZ DE VALLADOLID (La Voĉo de Valladolid).

Ekde la jardo 19-a kaj ene de la programo "La Klubo de la Vespero" estas programero pri Esperanto kiu okazas ĉiufoje kun daŭro de dek minutoj per RADIO VALLADOLID.

ANNONCO

Viaj individuaj kaj kolektivaj petoj pri E-ajoj al la Komisiono pri Uzbekio grave helpos al ni eldoni ilin, al vi ekkoni pri nia bela respubliko.

Dankon !

ESPERANTO KOMISIONO.

SEMAJNO DE LA INTERNACIA AMIKECO 1982

Kalmthout kaj ĉirkaŭaĵo

Programo je sabato, 27-a februaro 1982-a

Aktivecoj sub la aŭspiciado de la Ministerio de la Flandra Komunejo

- 9.30 h - 11.00 h: Konkurso por la elekto de la Beneluksaj Geambasadoroj de la Internacia Amikeco en la salono "Sankta Jozefo" apud la stacidomo de Heide.
- 11.30 h - 12.30 h: Akcepto en la komunuma domo de Kalmthout kun la instalo de la Beneluksaj Geambasadoroj.
- 12.30 h - 13.45 h: Okazo por tagmanĝi en la salono "Sankta Jozefo".
- 14.00 h - 16.00 h: Lintranspaŝa promenado je la moto: LIMOJ NE POVAS DISIGI NIN.
Forveturo je la 14.00 h per automobiloj ekde la stacidomo de Heide al la preĝejo de Kapellen-Putte (Belgio). Promenado tra la arbaroj de Putte.
- 16.00 h - 17.00 h: Akcepto en la komunuma domo de Putte (NB), Nederlando.
- 18.00 h - 18.45 h: En la preĝejo de Heide: Eŭkaristia Celebrado en la kadro de la Internacia Amikeco. La Gevira Moderna Ĥoro "Gojo" de la loka paroĥo kantas en Esperanto.
- 19.00 h - 20.00 h: Okazo por vespermanĝi en la salono "Sankta Jozefo".
- 20.00 h - 23.00 h: Internacia kultura vespero kun i. a. diapozitivoj pri Turkio en la sama salono.

Por pliaj informoj:

Jos Orban, Statielei 17 A, B-2160 Kalmthout-Heide
tel.: (031) 66 95 49

Vagonaroj	Forveturo	Alveno
Antverpeno - Heide	8.31 h	8.56 h
	9.31 h	9.56 h
Essen - Heide	8.32 h	8.43 h
	9.30 h	9.41 h
Heide - Antverpeno	21.59 h	22.34 h
	23.05 h	23.31 h
Heide - Essen	21.56 h	22.09 h
	22.56 h	23.09 h

ESPERANTO - DOMO
Grésillon, 49150 BAUGE (Francio)

Telefono:

- dum la aranĝoj: (41) 89 10 34
- ekster la aranĝoj: prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1982

PRINTEMPO

Alveno Dimanĉon 4-an de Aprilo posttagmeza - Foriro Dimanĉon 11-an de Aprilo matene

- Internacia renkonto de infanoj
- Diskuttrondoj pri lingvo-instruado

SOMERO

UNDA PERIODO

Alveno Dimanĉon 27-an de Junio - Foriro Sabaton 10-an de Julio

- PRELEGOJ diverstamaj
- diskutoj pri la prelegoj
- Studado de la lingvo
- Malkovro de la regiono

DUA PERIODO

Alveno Dimanĉon 11-an de Julio - Foriro Sabaton 31-an de Julio

- KURSOJ por komencantoj kaj progresantoj
- Studado de la lingvo
- Manlaborado
- Malkovro de la regiono

TRIA PERIODO

Alveno Dimanĉon 1-an de Aŭgusto - Foriro Sabaton 14-an de Aŭgusto

- STUDADO kaj PRAKTIKADO de la lingvo
- Prelecoj kaj konversacioj
- Manlaborado
- Malkovro de la regiono

KVARA PERIODO

Alveno Dimanĉon 15-an de Aŭgusto - Foriro Sabaton 29-an de Aŭgusto

- Artemioj (fotoarto, korboparado, librobindado, ...)
- Praktika uzado de la lingvo
- Kurso por komencantoj
- Malkovro de la regiono

N.B. : Seioj de ekzamenoj estas organizitaj kverkam la celo de la kursoj ne estas precize la preparado de tiuj ekzamenoj.

ESPERANTO - DOMO
Grésillon, 49150 BAUGE (Francio)
Poŝtkonto: Nantes 1425 39 P
BANKKONTO: 999A Nantes 58 019 02570 9

PREZOJ - POR 1982

Aliĝkotizo: postulata de ĉiu aliĝanto pli ol 16-jara por la pago de la kulturaj aranĝoj. Ĉambro aŭ lito estas rezervita nur post pago de tiu aliĝkotizo kaj de antaŭpago de 10% de la restadkosto. Tiuj sumoj ne estas repaigitaj en kazo de rezigno. La Ĉambro estas konsiderata libera post 1 tago (unusemajna restado), 2 tagoj (dusemajna restado), 3 tagoj (trisemajna restado) de ne anoncita malfruo.

- Printempo: 40 FF

- Somero: unu semajno aŭ malpli: 40 FF
du aŭ tri semajnoj: 80 FF

Taga prezo por restado de unu persono:

	pli ol 7 tagoj	7 tagoj aŭ malpli
Unulita Ĉambro	90.	110.
Ĉambro por familio (2 ĝis 5 litoj)	75.	90.
Komuna Ĉambro	65.	80.
Kampadistoj	60.	70.
Infanoj (3 ĝis 6 jaroj)(1)	40.	45.
Infanoj (1 ĝis 3 jaroj)	25.	30.
Infanoj malpli ol 1-jaraj	senpage	

(1) La infanoj pli ol 6-jaraj kiuj loĝas kun la gepatroj en familia Ĉambro pagas la tarifon "komuna Ĉambro".

N.B.: - Tiu tarifo entenas la tranĉtadon kaj tri manĝojn, sed ne la trinkaĵojn. La trinkmono estas entenata. Foreste dum restado ne estas repaigita. La ekakursantoj rajtas ricevi malvarman manĝon. La prezo de la restado estas kalkulita laŭ la daŭro de la rezervado se eventuala ŝanĝo ne estas anoncita aŭfiŝe frue.

- La E.-Domo akceptas nur esperantistajn kampadistojn. Ili devas preni ĉiujn manĝojn en la kestelo.
- La bestoj ne estas akceptitaj en la kastelo.
- La junuloj malpli ol 16-jaraj estas akceptitaj nur kun adultaj respondecaj personoj.
- Konfirmado de rezervado estos sendita al la petantoj kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono.
- La Domo disponigas nek tualet- nek buŝ-tukojn.

ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO FEDERACIO Montoyerstrato 37 B.24
B-1040 BRUSELO - Tel (02)5135995

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever).

La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS

Priorijstraat, 4 B 1720 Dilbeek.

Redaktoroj : serĉataj

NOVA ADRESO :

La ĝenerala sekretario de B.E.F. atentigas vin pri sia nova adreso, supre menciita : la komunumo ŝanĝis la nomon de la strato, kaj sekve la numeron de la domo.

ĈU VI LONGTEMPE ATENDIS CI TIUN BULTENON ?

Jes ? Ankaŭ mi, la sekretario (tio ne signifas redaktoro) atendis... kun granda malpacienco viajn skribaĵojn aŭ tajpaĵojn.

Vi esperantiĝis, do vi havas valorajn ideojn. Vi ŝatas komuniki kun la homoj, viaj gefratoj, en ĉiuj lokoj, urboj kaj regionoj. Kial do vi silentas ?

Vi havas kapon por pensi, koron por emociiĝi kaj ami, manon por manpremi kaj ankaŭ por skribi. Vi posedas la plej belan lingvon, por interkompreniĝi kun la tuta mondo ... Kaj vi silentas !

Al kio utilas ke vi estus sciencisto aŭ artisto, profesiulo aŭ amatoro, ke vi havus talenton aŭ genion, ke vi havus simple bonajn ideojn, belajn sentojn, se vi kaŝas ilin inter la muroj de via vivoĉambro ?

Cu vi ne kredas ke vi povas komuniki kaj disdoni la riĉecojn de via animo kaj de via spirito al aliaj homoj ?

Cu vi havos ia kapablon ? Cu vi havos la kuraĝon ? Aŭ ĉu vi hodiaŭ ankoraŭ legos la ĵurnalon, rigardos la televidon, aŭskultos la radion... bedaŭrande ke la paco, la feliĉo, la ĝojo ĉie malfortiĝas. Bedaŭrande ke la homaj amikeco kaj frateco malaperas ! Bedaŭrande ke tro malmultaj reagas !

Do se vi prenas bonan decidon, ne atendu plu, fiksi tagon de la semajno, rezervu unu aŭ kelkajn horojn por redakti artikolon... Kaj en la venontaj bultenoj, vi kaj la legantoj ĝojos vidi vian nomon inter la redaktoroj de Esperanto en Belgio.

A. M.G.

ALVOKO AL AKTIVULOJ KAJ VERKISTOJ

Kelkaj kuraĝaj aktivuloj jam volonte skribas artikolojn kaj libretojn, kiujn ili individue eldonas al organizoj aŭ grupoj en diversaj lokoj kaj urboj de la lando. Kial ili ne kunlaborus al la komponado de nia bulteno Esperanto en Belgio ? Tiel liaj verkoj kaj ideoj povus atingi regule kaj senkoste multajn membrojn de U.E.A. kaj asociojn en la lando, kaj ankaŭ kelkajn en eksterlando, kiuj ricevas la revuon.

Ilian kunlaboron multe ŝatus la sekretario, kaj ankaŭ pli la legantoj. Plurpaĝaj verkoj povus esti eldonataj en speciala numero aŭ en pluraj partoj ĉe la monata bulteno.

A. M.G.

BENELUKSAJ GEAMBASADOROJ DE LA INTERNACIA AMIKECO 1982 :

Ambasadorino : F-ino Myriam RUYSSINCK (studentino)
Ruytenburgstraat, 26,
2600 BERCHEM (Antverpeno)

Ambasadoro : S-ro Geert DEHOUX (Esp.-instruisto kaj muzikisto)
Guido Gezellelaan, 16,
2670 PUURS

ESTRAROJ

Pluraj regionaj aŭ lokaj organizoj recente elektis aŭ reelektis ilian estraron.

- La Flandra Esperanto-Ligo (F.E.L.)
 - Prezidanto : Edward SYMOENS
 - Vic-prezidanto : Roger DE SCHEPPER
 - Sekretario : Jan BOVENDEERD
 - Kasisto : Jules VERSTRAETEN
- La Flandra Esperantista Junulara Asocio (F.L.E.J.A.)
 - Prezidantino : Kristin TYTGAT
 - Vic-prezidantino : Gerd JACQUES
 - Sekretario : J.P. VANDENDAELE
 - Kasisto : Luc POTIAU
- La Brusela Esperanto-Grupo
 - Prezidanto : Emile VAN DAMME
 - Vic-prezidanto : Leo DE BRUYNE
 - Sekretariino : Jeanne BOUVY
 - Kasisto : Emile LADURON
- La Lieĝa Grupo
 - Prezidanto : Emile GILLET
 - Vic-prezidanto : G. RABOSEE
 - Sekretario : H. FRIGO
 - Kasistino : Denise DUPONT
 - Eksteraj rilatoj : Pol DENOEL

Korajn gratulojn al la sindediĉaj estraranoj !

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1982

Se vi deziras kunlabori, komuniku senprokraste viajn nomojn kaj adresojn, kaj la taskojn kiujn vi akceptus, al Jan Bovendeerd, c/o Esperanto-Centro Frankrijklei, 140, 2000 Antverpeno.

LA SOMERO DE LA MIGRADO

Dum la semajnfino de la 24-a aprilo vizitis la redakcion Sinjoro Arnljot Kyllingstad el Norvegujo. Li revenis el suda Hispanujo en aŭtokaravano. Survoje li kontaktis plurajn naturamajn esperantistojn cele al la starigo de reto de naturmigruloj. Jen resuman prezenton de la sistemo kiun li starigis.

Pli kaj pli da homoj ŝatas piedmigradon en la naturo. Nun ekzistas speciala sistemo por esperantistoj kiuj deziras praktiki tion en fremdaj landoj. Tiu sistemo havas en la momento ĉirkaŭ 50 reprezentantojn inter Barcelono kaj Genevo sude, kaj Glasgow kaj Bergen (N) norde. Jen la tri kondiĉoj por aliĝi :

- 1) Oni bone parolu esperanton. Skribi leterojn ne estu problemo ekzemple.
- 2) Oni donu efikan informadon pri migradeblecoj en la propra regiono. Ordinare konsultanto rajtas renkonti konsilanton persone.
- 3) Oni konu favorajn eblecojn por tranoktado, ne tro malproksimajn.

La kondiĉoj por uzi la sistemon ne estas precipe striktaj. En grupeto unu devas bone paroli esperanton.

Evidente estas nun ke la sistemo viviĝas. Lastsomere vizitis nin esperantistojn en la ĉirkaŭaĵo de Stavanger (N) pluraj eksterlandanoj. Ne ĉiuj parolis esperanton kaj antaŭ ĉio ne ĉio okazis laŭ originaj planoj. Sed la somero donis bonajn perspektivojn kaj ĉio estis pli malpli rektaj efikoj de la migradsistemo. Jen pli konkrete : Venis familioj el Svislando, Francio, Belgio, patro kaj filino el Parizo, tri personoj el Stokholmo. La parizanoj venis por migri sur nia fama Hardangra altebenaĵo sudoriente de Bergen. Iris kun ili esperantisto de la regiono. Ili migris dum tuta semajno, ĉion portante sur la dorso, ankaŭ la tendojn. Dum periodo komence en aŭgusto estis ĉe ni entute 9 gastoj. Iun sunbrilan tagon ni faris iomete specialan ekskurson. Ni elektis precipe belan lokon por tie renkontiĝi por trinki kafon. Kiel iri tien tamen mem oni povas elekti, ĉu per piede, kanote, bicikle. Jes, estas vero. En Rogalando (regiono de Stavanger) la naturo estas tiel varia ke eblas multaj aktivadoj en aero libera. Dum du-tri tagoj la gastoj havis kiel centron domon en la montaro nordoriente de Stavanger. Ili estis invitataj partopreni en la ekstera kadro de seminario de la regiona naturprotektado. Tio donis belajn eblecojn. Samtempe partoprenis tie tri norvegaj esperantistoj. La gastoj ankaŭ interkonatiĝis kun ceteraj norvegaj partoprenantoj, eĉ havis inviton poste viziti ilin en Stavanger, interalie la novelektitan prezidanton de la tutlanda naturprotektado. Ĉe li tiutempe loĝis raportisto de la belga televido, Sro. Raymond Dierckx (sic.) kiu poste raportis pri la tieaj naturbelaĵoj en du elsendoj je 13. dec. '81 kaj 18. aprilo '82 de la programo 'Leven en laten leven'. Interesuloj povas direkti sin al la redakcio por pliaj detaloj.

Redaktis Esperanto Aktuala, av. du Capricorne 129 B-1200 Bruselo.

LASTMINUTA INFORMO !



La Organiza Komitato ĝojas informi,
ke La Reĝo de Hispanio, Juàn Carlos I,
transprenis la Honoran Patronecon
de la Seminario.

INTERNACIA SEMINARIO PRI SPORTO

(Madrido, 8-11 julio 1982)

Sub la aŭspicioj de UEA kaj de Hispana Esperanto-Federacio.

Prezidanto de la Honora Komitato: la hispana Ministro pri Transporto, Komunikado kaj Turismo.

Korespond-adreso: Madrida Esperanto-Liceo, Seminario pri Sporto, Atocha 98, Madrido-12, Hispanio.

Banko: Caja de Ahorros y Monte de Piedad, Calle Ferrocarril 42, Madrid.
Cuenta M.E.L. Simposium n.º 60-2072-45

CELOJ. La Seminario okazos kunlige kun la Mondaj Futbalaj Ĉampionludoj, kiuj havos lokon en Madrido en 1982. Ĝi celas studi per Esperanto la diversajn aspektojn de la moderna sporta fenomeno kaj per tio publike elmontri la utilecon de Esperanto je la servo kaj por la antaŭenigo de la sporto.

KUNVENEJO. La laborkunsidoj okazos en la fest-salono de la Supera Teknika Lernejo de min-inĝenieroj.

ĜENERALA PROGRAMO. La kadra programo intencas doni la eblecon al la partoprenantoj ĉeesti la seminariajn sesiojn, ĝui pri turismaj ekskursoj tra Madrido kaj Hispanio partopreni en distraj aranĝoj, kaj spekti mond-eventajn futbal-matĉojn.

LABOR-KUNSIDOJ. Estas antaŭvidite, ke matene okazu du 90-minutaj sesioj kun kafo-paŭzo. Ĉiu sesio estos enkondukita de mallonga raporto zorge de fakulo, post kio sekvos ĝenerala diskuto. En sia ferma sesio, la Seminario adoptos finan rezolucion, trasdonotan al la mondaj sportaj instancoj, en kiu la lingva demando en la sporta kampo estos pritaktita.

Estas antaŭvidite, ke la sesioj pritaktu jenajn temojn:

- «La pozicio de la sporto en la juro» (enkonduko: D-rino Rafaela Uruña, docento ĉe la Universitato de Valladolid, Hispanio).
- «Sociaj demandoj de la sporto» (S-ro P. Forster, docento ĉe la Universitato de Hull, Britio).
- «La sporto en la literaturo» (D-ro Humphrey Tonkin, profesoro ĉe la Universitato de Filadelfia, Usono).
- «La lingva problemo en la sporto» (D-ro Gianfranco Polerani, Milano, Italio).

- «Medicinaj aspektoj de la sporto» (D-ro Jean Luc Tortel, kuracisto, Berck, Francio).
- «Prisporta ĵurnalismo» (S-ro Roman Dobrzynski, televida ĵurnalisto, Varsovio, Pollando).
- «La aliro de la handikapuloj al la sporto», «Filozofio kaj praktiko de la sporto en Oriento».
En la momento de la preso de la nuna provizora programo, ne ĉiuj invititaj raportantoj jam konfirmis sian partoprenon.

DISTRAJ ARANĜOJ. Estas antaŭviditaj:

- Bonveniga vespero .
- «Queimada», tipa galega festo.
- Vizito al folkloraj Madridaj trinkejoj.
- Koncerto en la parko «El Retiro».
- Vizito al la mond-fama Muzeo «Prado».
- Vizito al la Madrida minej-lernejo (kaj al ties minejo).
- Ĝisrevida vespero en la Luna Parko.

EKSKURSOJ. La partopreno en la ekskursoj estas, kompreneble, libervola kaj okazos kontraŭ antaŭpago de la koncerna tarifo. Estas antaŭviditaj:

- Duontaga ekskurso al Toledo, unu el la plej vidindaj muze-urboj de Eŭropo, sidejo de la plej riĉa kolekto de pentraĵoj de El Greco.
- Duontaga ekskurso al la vilaĝo Chinchon, kie oni produktas la faman likvoron.
- Duontaga ekskurso tra Madrido.

FUTBAL-MATĈOJ. La matĉoj de la Mondaj Futbalaj Ĉampion-ludoj estos antaŭvideble dissendataj ĉiutage fare de la hispana televido. La Seminaria organiza komitato esperas atingi, ke la seminarianoj povu spekti en la Madrida stadiono la finan matĉon, dimanĉon la 11-an de julio, kiam la venkinta teamo estos proklamita mond-ĉampiono.

POST-SEMINARIO KAJ HISPANA KONGRESO. Laŭ ŝato, post la Seminario la ĉeestintoj povos partopreni en turisma ekskursiva programo en suda Hispanio, preparata de la Esperanto-Societo de Sevilla (adreso: Sol 75, Sevilla-3)

Post la Sevilla-j tagoj okazos la Hispana Esperanto-Kongreso, de la 16-a ĝis la 21-a de julio 1982, en Málaga, ĉe la Mediteraneo.

MANĜOJ. Oni povas manĝi en Madrido relative malmultekoste. Kombinita menuo kostas ĉ. 350 pesetojn.

INTERNACIA SEMINARIO PRI SPORTO
(Madrido, 8-11 julio 1982)

Bonvolu resendi antaŭ
la 15-an de junio 1982 al:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98
Madrido-12 (Hispanio)

ALIĜILO

Antaŭnomo kaj nomo

Adreso

Pagoj

Aliĝo al la Seminario (1.000 pesetoj antaŭ la 15-a de aprilo 1982; 1.500 pesetoj inter la 15-a de aprilo kaj la 15-a de junio 1982)

Aldonaj servoj (indiki la elekton per kruco en la koncerna kadro).

LOĜADO

bonvolu rezervi por mi:

- unulitan/dulitan ĉambron (forstreki la nedeziritan)
- en dustela hotelo/pensio (forstreki la nedeziritan)
- studentan loĝejon.
(antaŭpago necesa: 1.000 pesetoj)

EKSKURSOJ

bonvolu mendi por mi:

- duontagan aŭtobusan ekskurson tra Madrido (975 pesetoj)
- duontagan aŭtobusan ekskurson al Toledo (1.350 pesetoj)
- duontagan aŭtobusan ekskurson al Chinchon (400 pesetoj)

Sumo

PAGOJ

La menciitaj pagoj okazas:

- per aldonita banka ĉeko
- per transpago al la Seminario konto ĉe Caja de Ahorros y Monte de Piedad, Calle Ferrocarril 42, Madrid. Cuenta M.E.L. Simposium n.º 60-2072-45.

Ĉiuj prezoj supre indikitaj estas validaj en Madrido komence de 1982 kaj povus esti modifitaj je la dato de la Seminario. En tiu kazo la seminarianoj estos petataj je alveno kompagni la diferencon.

Dato Subskribo

LOĜADO EN MADRIDO. Pro la Futbalaj Ĉampion-ludoj estos malfacile trovi loĝadon en Madrido dum la Seminario periodo. Tial la partoprenantoj nepre devos rezervi sian hotel-ĉambron kiel eble plej frue. Ili povos tion fari per unu el la subaj vojoj:

- aŭ prefere pere de sia vojaĝ-agentejo samtempe kun la mendado de la flug-aŭ fervoja bileto;
- aŭ pere de la Seminario Organiza Komitato

La menciita Komitato akceptos mendojn nur ĝis la 31-a de majo 1982. Post tiu dato, ĝi ne plu povos prizorgi la loĝadon de la seminarianoj.

Provizoraj prezoj (inkluzive de servomono kaj impostoj, sed sen matenmanĝo):

- dulita ĉambro (du personoj) en hotelo, kategorio 2 steloj inter 1.600 kaj 2.000 ptoj. proksimume
- unulita ĉambro en sama kateg. inter 1.000 kaj 1.600 ptoj. proksimume
- unulita ĉambro en pensio inter 900 kaj 1.100 ptoj. proksimume
- unulita ĉambro en studenta loĝejo 460 pesetoj proksimume

La supraj prezoj, validaj en januaro 1982, verŝajne estos rimarkeble plialtigitaj en la venontaj monatoj. Loĝej-mendo pere de la Organiza Komitato okazas per la aldonita aliĝilo kaj estas akompanata de antaŭpago de 1.000 pesetoj

KOTIZO. La aliĝo-kotizo, kiu rajtigas partopreni en la Seminario kaj ricevi ties dokumentojn kaj servojn estas jena: ĝis la 15-a de aprilo 1982 = 1.000 pesetoj; inter la 15-a de aprilo kaj la 15-a de junio 1982 = 1.500 pesetoj.

Post la 15-a de junio 1982, la Organiza Komitato ne plu akceptos aliĝojn.

REPAGOJ En kazo de maleblo partopreni en la Seminario kaj malmendo ĝis la 30-a de junio 1982, ĉiuj antaŭ-pagoj, inkluzive de la kotizo, estos repaigitaj, post depreno de 15 % pro bankaj kaj administraj kostoj.

AGADO SUR NACIA KAJ FAKA KAMPO

Ĉiu nacia kaj faka asocio havu en ĝia estraro turisman komisionon k komisiiton se tio ankoraŭ ne ekzistas.

Tiu nova aldona strukturo facile, senkoste, povas esti realizata.

Por ĝia realigo necesas kunsido al kiu estu invitataj ĉiuj enlandaj fakaj delegitoj pri turismo de UEA, de Monda Turismo, aŭ de alia paralela organizo, kiel ekzemple Internacia Fervojista Esperanto Federacio, Naturamika Movado, ktp.

Ni konscias ke inter ili estas multaj da bonvolemaj amatoroj, sed tamen ankaŭ kelkaj fakuloj aŭ homoj kunserto pri turismo. Monda Turismo ĉiam estos preta por kunhelpi al ĉi tiu agado kaj konsultdoni tie kie estas esprimita la deziro.

En ĉiu loka grupo estu estrarano pri turismo kaj en la jarprogramoj aperu pluraj turismaj programeroj.

TURISMA ESPERANTO KALENDARO 1982

Tricento da esperanto aranĝoj estos komunikataj en nia nova turisma kalendaro.

Ĝi estas eldonata de Esperantotur el Bydgoszcz. Eldonkvanto 5000 ekzempleroj. Ĉiuj reprezentantoj de esperanto-turismo kaj fakdelegitoj de UEA, pri turismo, ĝin ricevas. Malfruiĝo cirkonstanca !

Ĉefa enhavo

Informoj pri Monda Turismo, Landaj Reprezentantoj, vojaĝoficejoj kiuj uzas esperanton, Konkursao Esperanto en Turismon, Jam la dua jaro la UEA-prezidanto faris la enkondukan artikolon.

LA TRIMONATAJ TURISMAJ SEMINARIOJ UEA

proponitaj de Monda Turismo havas la aprobon de la prezidanto S-ro Maertens k de la nova Konstanta Kongresa Sekretario S-ro Masterman.

La celo estas kontaktigi la KKS kune kun la movadaj aktivuloj pri turismo kaj komune plani kaj diskuti la kunordigado de la esperanto turisma agado.

TURISTA KANTARO



Esperantistoj, turistoj tendumantoj, kongresanoj aŭ, simple nur grupanoj kiuj ŝatas kantadi, kun ĝojo ricevos ĉi - tiun libreton. - Prezo: 6,6 NLG. La kantoj estis elektitaj tiamaniere, ke por diversaj aranĝoj kaj okazajoj oni trovu la konvenan pecon ŝatatan! Eldonita por MONDATUR. INFO: E. PALLOS Ybl. Miklos u.9 I em.2. H - 7633 PECS HUNGARIO.

MEMBROKOTIZADO AL MONDA TURISMO

Ĉiu kiu agadas por la Esperanto-Turismo, kaj kiu esprimis la deziron pri aliĝo, senpage povas membriĝi.

Ĉiu kiu deziras subteni la agadon de MONDA TURISMO povas fari tion per minimuma kontribuo egale al 10 respondkuponoj internaciaj.

Dunviva membro pagas 25-oblan egalvaloron al Internacia Respondkupono.

La kotizojn kolektas la landaj reprezentantoj de Monda Turismo. La adresoj kaj kontoj estas menciitaj en la ĉiujara "Turisma Kalendaro"

DOKUMENTIGADO PRI TURISMO

Ĉiuj materialoj kaj artikoloj pri Esperanto-Turismo aŭ paralela agado estu sendataj al B-ino Heta Kesälä, Kalamiehentie 8 D 32 SF-04300 HIRYLA-FINLANDO

Ankaŭ tiurilatataj nacilangvaj artikoloj estas bonvenaj, sed tiam kun esperanta resumo.

Specialaj premioj estos aljuĝataj al la plej bonaj ensendaĵoj sed ankaŭ al la kunlaboranto kiu faris la plej grandan nombron da ensendoj.

ESENCO DE LA ESPERANTO - TURISMO

- 1 : Doni al la esperantistaro bonajn vojaĝeblecojn
- 2 : Oferti Esperanton kiel utilan rimedon por la internacia turismo
- 3 : Organizado de aŭ partopreno al amaturismo en kiu la esperantistaro formas kroman lingvan grupon pruvante la valoron de la internacia lingvo.

TUTMUNDAJ
INTERHOMAJ
SENDEVIZAJ
KULTURAJ
INTERRILATOJ

LA PAGRIMEDOJ BREMSAS LA INTERHOMAJN KONTAKTOJN

...pro la fakto ke 3/4 de la homaro havas devizajn malfacilaĵojn. En sia lando ili proporcie ne estas malpli riĉaj ol la homoj en la alia kvarono, kiuj ne havas tiujn malfacilaĵojn !

Pro la sama kaŭzo miloj da esperantistoj ne povas aliĝi al nia movado kaj kvazaŭ almuzoj povas partopreni al niaj internaciaj renkontiĝoj. Tamen, nuntempe, siaj prezentas intersangeblecoj kiuj finance kaj politike estas sendanĝeraj. Laŭplana utiligado de la prezferencoj inter oriento kaj okcidento havigas, ja arkaikan sed nuntempe, utilan pagrimedon al niaj gesamideanoj kun internaciaj devizaj malfacilaĵoj. Specialistoj facile povas taksii la valoron de proponitaj esperantaĵoj, kulturaĵoj kaj turismaĵoj. De la taksita sumo devos esti subtrahataj la eventualaj dogankostoj, tamen ankaŭ eviteblaj, kaj 20 % por la administraj kaj makleraj kostoj. El UEA-konto eblos pagi kien kaj iam ajn ! La sistemo eĉ grandskale povus esti adoptita por la pego de aliĝoj al internaciaj renkontiĝoj okazantaj en okcidento. Grandmagazenoj, public-tele, plezure organizus la vendadon de tiuj aĵoj sub la titolo "HELPO AL HOMOJ KUN DEVIZAJ MALFACILAĴOJ" -Pliaj informoj ĉe E.E.C. BRUSELO.

REBAT-GAZETARA SERVO.

Ni organizu nian mem defendon !

De longa tempo, ni spertas tion, ke malamikoj de Esperanto tre supraj ĝin konas, eĉ nenion taŭgan pri ĝi scias !

Ankaŭ ĝenerale fariĝas malamikoj de Esperanto kleruloj, kiuj profesmajstras sciencan fakon, eĉ fremdajn lingvojn !

Ju pli konsiderindaj fakuloj tiuj-ĉi estas, des pli grandan aplombon ili havas por ataki la internacian lingvon ! Normale, ĉu ne ?

Bedaŭrinde, ankaŭ fariĝas danĝeraj malamikoj de Esperanto, tiuj esperantistoj, kiuj ĝin malbone defendas kaj false argumentas !

Tiuj-ĉi esperantistoj pensigas al Supermuso, kiu sincer-kaj kontraŭbataladas la aĉan gigantan katon en la desegnitaj filmoj de W. Ney ! En la filmoj, Supermuso venkas, Supermuso triumfas ! En la vivo, ni am !

Pro tio, ni sincere salutas la taskon de S-ro Germain Pirlot, kaj la alte aprecindan agadon pro REBAT-GAZETARA SERVO !

Atendante pli ampleksan alproksimiĝon de la problemo, niaj klubanoj bone observu, kion oni bone aŭ malbone skribas aŭ diras pri Esperanto, kaj ajn !

Tiam, kion fari ? Ĉiufoje reagi, ĉu ne ?

Sciigu de vian subtenon al tiuj, kiuj helpas al nia afero ! Kiam vi on kapablas, ĝentile, afable rebatu al tiuj, kiuj eraras aŭ konfuzas !

Tamen, povas esti, ke la tasko ŝajne tro malfacilas ? Tiam, ne rezinu, sed vi transdonu la artikolon fortranĉitan de la gazeto, kun dato kaj titolo al pli spertaj amikoj el la grupo... aŭ simple rekte havigu ĝin al S-ro Germain PIRLOT, Kemmelbergstraat 5 B 3. B-8400 Oostende.

Jen ŝiutaga ebleco helpi, ĉu ne ?

C.T.

KORESPONDDEZIRO

Mi kaj miaj geklubanoj deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde pri ĉiuj temoj.

Skribu al : S-ro NGO CHAN LY - *539/TK2/20 - Trân Hùng Đạo -
TP. Ho Chi Minh - Vietnam.

VJETNAMA ESPERANTO - CORSO.



DUA TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO A.A. 54800 - BOGOTO - KOLOMBIO

22 - 03 - 82

"Esperanto kaj la Pacaj Interrilatoj de Ĉiuj Landoj" estas pli ol centra temo de Kongreso, ĝi estos la komenco de pli efektiva agado de la Esperantista Movado kun nepra reago ĉiulke en la mondo.

Ne estas produkto de hazardo ke tiu ĉi Kongreso, en kiu ni ne nur parolos sed agos por la paco, realiĝu en amerika lando kaj ke samtempe kun ĝi okazu la Unua Tutamerika Renkontiĝo de Junularo en kies manoj troviĝas granda parto de la sukceso de la Dua Tutamerika Kongreso, de la Esperantista Movado kaj de la Monda Paco.

La temo de la Paco longe diskutata dum la homara historio havos sukceson nur pere de vere internacia, neŭtrala lingvo en kies esenco la Paco antaŭeniras al renaskiĝo de la mondo.

Mi kredas ke tiu ĉi momento estas grava por la Esperantista Movado ĉar ĝi jam sufiĉe maturiĝis por ke, de la Tutamerika Kongreso kaj kiel rezulto de 96 jaroj de laboro, la filozofio kaj kulturo de nia lingvo ekinfluu definitive la socikulturajn disvolviĝojn de la monda historio ĝis kiam la gvidantoj, amikoj de frateco kaj monda paco alparolos la direktantojn aŭ iliajn reprezentantojn (UNO, UNESKO, k.a.) per nekompromisita lingvo kiu, pro sia esenco, ne estas kaj neniam estos ilo por premi homon aŭ popolon.

pro tio, mi kredas ke la venonta jaro, Internacia Jaro de Komunikado ankaŭ estos sendube tiu de la Internacia Lingvo Esperanto kaj kompreneble ĝi estos pritraktota punkto dum la Kongreso; konsekvence unu el la centraj punktoj en ĝi, estos la rinedoj kiuj helpas konduki instruadon de la lingvo kaj ĝiajn principojn en la instrucentroj ĉe la tuta terglobo.

Aliflanke, la laboro de kunsidoj kaj komisionoj per la aktiva partopreno de esperantistoj estos la baza laboroprogramo de la Dua Tutamerika Kongreso.


Tiuj kiuj havas kompromison kun la sukceso de tiu ĉi evento fin ne pensas pri la nepra neceso ke ĝi produktu efikajn konkludojn rezultate de la konsciaj interŝanĝoj de la partoprenantoj. Pro tio, mi invitas ĉiujn tutamerikajn asociojn iri sin reprezenti en la Kongreso. Mi esperas havi abundan kaj selektan ĉeeston, havi vanmeran renkontiĝon de ĉiuj kiuj volas partopreni ne nur el Ameriko sed el Eŭropo, Azio, Afriko aŭ Aŭstralio sed, antaŭ ĉio, ĉeesto de reprezentantoj elektitaj de iliaj asocioj por, kun ili, aŭtonomie difini kaj efektivigi la amerikajn esperantistajn konkludojn.

Eble, mi ne plenumos ĉiujn miajn celojn sed mi kuraĝas kredi ke se mi, plenaj de esperantista spirito povas interesiĝi la registarojn, ĉiujn asociojn kaj instituciojn kiuj laboras por la paco pri la Internacia Lingvo, ne estos nerealigebla afero eklanĉi el la Dua Tutamerika Kongreso virilan plebisciton kiu kunportos al la plej altaj instancoj la peton de monda paco pere de la lingvo de la paco kune kun milojn da personoj kiuj petos ĝin konvinkitaj pri nia idealo.

Krome, dum la Kongreso mi plifortiros la interrilatojn de USA kun Ameriko kun la deziro ke tuj post la Kongreso mi havos pluraĵn ambasadejojn alproksimigante nin por labori pro kaj por nia movado en egalaj kondiĉoj al tiujde Eŭropo.

Kiel direktoro de LKK de la Dua Tutamerika Kongreso, mi invitas la amerikan esperantistan movadon -ĉiujn homojn ĉar en esperantujo ni ne faras diferencon pri raso, sekso, aĝo aŭ alia klaso-partopreni en nia Kongreso same kiel observantojn de aliaj kontinentoj ĉar ni volas ricevi iliajn spertojn.

Santepe, mi petas al tiuj kiuj ricevos tiun ĉi cirkuleron transdoni ĝin al aliaj personoj por ke ĉiuj kiuj volas ĉeesti ne perdu la ŝancon. Mi volas fari specialan inviton al tiuj, kiuj kvankam ne parolas la lingvon, komprenas kaj konsentas kun ni la esperantistajn idealojn ankaŭ sendi iliajn respondojn de apogo al nia programo de la Dua Tutamerika Kongreso kiu okazos de la 17a al la 20a de julio ĉi jare.


SANTIAGO ALVAREZ G.
Direktoro - LKK.
D. T. E. K.

EN BGGOTO POR LA PAGO ! NENIAM PER PERFORO, MALANK Aŭ MILITO !

Monata bulteno

(Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 B.24

B-1040 BRUSELD - Tel .0015135995

ESPERANTO EN BELGIO



Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever).

La ĝenerala sekretario : Andre MERTENS GOOSSENS

Polonijsstrato, 4 B 1700 Dilbeek.

PASPORTA SERVO

Jus aperis la nova listo de gastigantoj 1982. En ĝi troviĝas 477 adresoj el 48 landoj de la tuta mondo.

Kio estas pasporta servo ?

Kreita de TEJO en 1974 laŭ ideo de D-ro Ruben FELDMAN-GONZALEZ, Pasporta Servo celas promociigi interesan turismon, interkulturan kompreniĝon kaj internacian amikecon per kontaktigo de homoj kiuj deziras vojaĝi eksterlanden kun tiuj, kiuj deziras renkonti kaj akcepti gastojn en propra hejmo.

Ofte persono deziras kaj vojaĝi kaj akcepti eksterlandanojn, sed ne ĉiuj havas oportunecon gastigi (ekz. junuloj ne havantaj propran loĝejon).

Tial Pasporta Servo ne postulas nepran reciprokecon.

Kiel gastiganto ekde 1980 mi ĝis nun ricevis la viziton de unu japanino, du japanoj, unu aŭstralianino, du poloj, kvar polinoj, unu brito, du francinoj, unu svisino kaj unu usonano ...se mi nenium forgesis.

Ĉiuj alportis al mi tre agrablajn horojn de frateca amikeco.

Kiam mi havos iom pli da tempo, mi povos rakonti al vi multe pli pri iliaj vizitoj. La plej interese estas ĉiam la okazo paroli Esperanton kun homoj kiuj venas el ĉiuj partoj de Eŭropo aŭ de la mondo !

Ĉu vi ne ŝatus tion ? Se vi disponas je ĉambro aŭ ĉe je iu malgranda loko, - ne hezitu kontakti la Pasportan Servon de TEJO.

La belga peranto estas :

Ite TYTGAT, St. Hathebrandstr.8 B-2510 MORTSEL.

A. MG.

67a universala kongreso de esperanto antverpeno, belgio

1982 julio 24-31

alta protektanto Lia Reĝa Moŝto Balduino de Belgio



(Foto: Belga Instituto de Informado kaj Dokumentado)

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1982 (lasta alvoko)

Se vi deziras kunlabori, komuniku senprokraste viajn nomon kaj adreson, kaj la taskojn kiujn vi akceptus, al Jan Bovendeerd, c/o Esperanto-Centro Frankrijklei, 140, 2000 Antverpeno.

honora komitato

Hendrik Brugmans	Emerita rektoro Eŭropa Kolegio (Brugge)
R. Clara	Rektoro Universitata Instituto Antverpeno
Daniel Coens	Ministro pri Nacia Edukado (nederlandlingva)
A. Daelemans	Ĝenerala direktoro de la Nacia Sekretariato de la Katolika Instruado
André Damseaux	Prezidanto de la Valona Regiono
Christian de Duve	Profesoro de biokemio. Nobelpremiito en 1974
Jean Defraigne	Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj
René della Faille	Prezidanto de la konsilio de la Reĝa Asocio de Zoologio en Antverpeno
P. D'Hondt-Van Opdenbosch	Nacia ŝtatsekretariino pri Poŝto, Telegrafo kaj Telefono
Gaston Geens	Prezidanto de la Flandra Ministraro
J.F. Geeraerts	Direktoro de la Zoologia Ĝardeno
Marcel Hoebeke	Konstanta sekretario de la Reĝa Akademio pri Nederlanda Lingvo kaj Literaturo
Karel Jonckheere	Poeto
Andries Kinsbergen	Guberniestro de la Provinco Antverpeno
Edward Leemans	Prezidanto de la Senato
Wilfried Martens	Ĉefministro
Philippe Moureaux	Prezidanto de la franclingva ministraro
Karel Poma	Komunuma ministro pri kulturo
Maria Rosseels	Literaturistino
Mathilde Schroyens	Urbeŝtrino de la Urbo Antverpeno
Leo Tindemans	Ministro pri eksterlandaj rilatoj
Michel Tromont	Ministro pri Nacia Edukado (franclingva)
Freddy Willockx	Deputito
Yvan Ylief	Deputito



La kongreso okazos sub la aŭspicio de la urbo Antverpeno.

loka kongresa komitato

Prezidanto
Vicprezidanto
Sekretario
Kasisto

Deputito Fernand Piot
Edward Symoens
Roger de Schepper
Erhard Boehme

Membroj
Komisiito pri la Kongresejo
Komisiito pri Ekskursoj
Membro
Komisiito pri la Gazetara Servo
Komisiito pri Infana Kongreseto
Komisiito pri Artaj Aranĝoj
Komisiito pri Junularaj Aferoj
Komisiitoj pri Loĝado

Jan Bovendeerd
Petro de Smedt
Wim de Smet
Ivo Durwael
Marie Grela
Jo Haazen
Gerd Jacques
Henny Jacques
Rosette van Herck
Frans Luyten
Anne Tilmont
Diccon Masterman

Komisiito pri Filatelajoj
Komisiito pri la Informa Servo
Konstanta Kongresa Sekretario

☆☆☆

Revizoroj

Jules Verstraeten
Ph. van Stevens



Ĉu la plej juna kongresantino ?

LEGU KAJ MIRU !

Kvinjara knabino jam parolas 3 lingvojn

BEHRMANN, MARIANN ILDIKÓ



Ŝi naskiĝis la 20-an de aprilo 1977 en Budapeŝto. Ŝia patro estas germano, la patrino hungarino, ilia komuna lingvo estas la Internacia Lingvo

Mariann vivas plejparte en Budapeŝto kun sia patrino, ŝi ekparolis en la hungara, sed baldaŭ ankaŭ en Esperanto. Kiel 2,5-jarulino ŝi komencis viziti en Budapeŝto duontagan privatan infangardenon, kie ŝi lernis kelkajn germanajn infankantojn kaj poemojn, sed poste ŝanĝinte tiun infangardenon je tutaga, komplete hungarlingva, ŝi iom post iom forgesis ĉe tiujn kantetojn.

La gepatroj decidis, ke ŝi kun la patrino venu al la patro al FR Germanio (Paderborn) por lerni la germanan en natura lingva medio. Ŝi havis precize 4,5 jarojn, kiam ŝi ekvizitis infangardenon en Paderborn, kaj post duona jaro ŝi parolas la germanan tiel, kiel similaĝaj infanoj en ŝia medio.

Kun sia patro ŝi parolas ekskluzive germane, kun sia patrino — hungare, kaj en cetera internacia medio en Esperanto.

Ŝi partoprenis kun siaj gepatroj la 2-an Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj (REF) en Szombathely (H) en 1980 kaj la 3-an REF en Žilina (ĈS) en 1981. programerojn el Junulara Esperantista Renkontiĝo (JER) en Szombathely 1981, 19. Somera Esperanto - Universitato (SEL) en Gyula (H) 1981, Vintraj Esperantistaj Ferioj (VEF) en Budapeŝto kaj 25. Internacia Seminario Festivalo (ISIF) en Sensenstein (D) 1981/82. Plue plurajn kunsidojn, konsultiĝojn, konferencojn, seminariojn, prelegojn, lemokonkursojn, instruborojn k.s. ekde sia naskiĝo, kiam la patrino devis kunporti ŝin.

Al siaj plej fruaj Esperanto-lingvaj societoj apartenas ŝia grandfratino, Iris Behrmann, krome Ines kaj Tilo Frank, Palma kaj Nóra Csizsár, Martinjo Wacha, laste Karina Kehlet.

Nun ŝi jam iom legas kaj skribas en la hungara kaj en Esperanto, sed la germana ortografio estas tamen tro komplika por infangardenanoj.

Ŝi satas bicikli, naĝi, sledi, gimnastiki, ludi sur ludejo, ankaŭ en ĉambro kun aliaj geknaboj.

Ŝi estas amikigema kaj vigla knabino kun infanoj (kaj plenkreskuloj), kiuj ludas kun ŝi do kiuj renkontos ŝin dum Esperanto-aranĝaĵoj, ekzemple en la Infankongreseto en Antverpeno, certe rapide interamikigos kun ŝi.

El "Europa Dokumentaro - Junulara Paĝo"

Red. Ines Ute Frank, Anna kaj Eva Formaggio.

ESPERANTLINGVAJ NE-ESPERANTISTAJ ELDONAĴOJ

Libro pri psikologio

Mi aĉetis libron titolitan "La Homa Flanko de Homoj" kiu estis eldonita de "Rational Island Publishers" el Uaŝington, Usono. Ĝi estas verko de sciencisto Harvey Jackins kaj klarigas la teorion de "retaksa konsilado".

Ĝin esperantigis Martha Lighthouse, Mary Catherine Sears kaj Robert Bailey.

Ĝi mendeblas ĉe Odette Philippart, Lievensstr. b.5 en B-2000 Kessel-Lo, kaj kontraŭ pago de 155 B.F. al konto 001-0966980.63 de Publi-RC Europe, 3200 Kessel-Lo.

Gramofondisko

B.E.F. ricevis preskomunikaĵon de la granda entrepreno "Inelco" kiu reprezentas la societon "ARION" de Parizo. Tiu lasta anoncas la tujan eldonadon de unua disko de esperantlingvaj kantoj : "Esperanto kaj Libereco,,.

Verkitaĵ de Max Roy Carrouges kun muzikaĵoj de Tany Iurens, ili estas interpretataj de la verkisto, kaj akompanatoj de la orkestro de Jean-Claude Passaga.

Eldonistoj estas SACEM, SDRN kaj EMAS EMILHENC.

La disko, entenanta dekdu kantojn, eldonatos en la serio "Muzikoj de la Mondo" sub koverto kun tekstoj de la kantoj.

A. MG.

LIBRO-SERVO S O N O R I L O
Doornstraat 22
B-2610 WILRIJK

Direktoro : Monique VEREecken
Telefono : 03/827.24.04
Konto : 000-0152140-44

SENPAĜA NUMERO DE "Heroldo de Esperanto"

Komence de septembro aperos speciala duobla ilustrita numero de "Heroldo de Esperanto", entute dediĉita al la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno.

La numero enhavos detalajn raportojn kun bildoj pri la kongresaj laboraj, kulturaj kaj distraj programoj, intervjuojn kun la ĉefaj kongresaj figuroj, same kiel raportojn pri la aliaj manifestacioj : Junulara Kongreso en Loveno, Infana Kongreseto, Blindula Kongreso, ktp.

Ciuj interesiĝantoj povas peti senpagan ekzempleron de tiu kongresa numero al la redakcio : Heroldo de Esperanto, Calle de Juan Ramon Jimenez 28, 6^oA, Madrid 16, Hispanio.

GENERALAJ KOMUNIKOJ

ESPERANTO AALST - NOVA ESTRARO

Prezidanto : Petro DESMEDT
 Vice-prezidanto : Raymond STEENHOUDT
 Sekretario : Erik D'HONDT
 Kasisto : Maurice DE WIT
 Membroj : Clement AMANT
 Hugo DOSSCHE

JURNALISTOJ KAJ VERKISTOJ

... aŭ aliaj skribemaj Esperantistoj, la revuo estas ĉiam malfermita al viaj skribaĵoj : via nomo aŭ kaŝnomo estos menciita en la listo de la redaktoroj. Viaj artikoloj atingos multajn legantojn kiuj ricevas la bultenon en- kaj eksterlande. Vi povos ankaŭ ricevi (senpage) kelkajn ekzemplerojn por sendi al amikoj aŭ konatuloj.

ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 B.24

B-1040 BRUSELO - Tel (02)5135995

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever).

La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS

Priorijstraat, 4 B 1720 Dilbeek.

B.E.F. - ESTRARO

Prezidanto : Marc DEMONTY (Bruselo)

Vicprezidantoj : Lambertine DREZE (Lieĝo),
Edward SYMOENS (Kalmthout)

Sekretarioj : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo),
Clément THOLET (Lieĝo),
Jan BOVENDEERD (Mortsel)

Kasisto : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno).

Belga Esperanto - Federacio

sekcio de

Universala Esperanto - Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesco

Laŭ rotacia sistemo, post la du ĝeneralaj ĉefkunsidoj de ŝEF en Lieĝo (1980) kaj Bruselo (1981), la ĉi-jara kunsido okazos en Antverpeno, en la Esperanto Domo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Ĝi okazos je sabato 6-a de novembro, laŭ jena skemo :

A) Estrarkunveno

Je la 10-a horo .

Tagordo : preparo de la ĝenerala kunsido .

B) Ĝenerala Ĵarkunsido

Je la 14-a horo

tagordo (sub rezervo de eventualaj ŝanĝoj)

1. Aprobo de la protokolo pri la ĝenerala kunsido de 3.10.81 .

2. Raportado : financa

Eldonejo SONORILO

I.L.E.I.

B.E.F.A.

Fondaĵoj JAUMOTTE-LOQUET kaj JENNEN-DEBROUWERE

3. Jarraportoj (ŝEF / FEL / APE)

4. Elekto de la administrantaro
plenumkomitato

5. Destino de la rentumo de la fondaĵo JAUMOTTE-LOQUET

6. Preparo de la jubilea jaro 1987 .

7. Diversaĵoj .

C) Kromaj programeroj

Estas antaŭviditaj krome :

1. Tagmeza kunveno de I.L.E.I. (+ 12.00 - 14.00)

2. Turisma programo en Antverpeno por nekunvenemuloj.

Estu bonvenaj !

ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno

Jarkolekto

N^o

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 BRUSE
 Postĉekkonto 000.0163434.B6 Tel (02)51359

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
 La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstraat, 4 B-1720 DILBE

Redakcio : La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por tiu bulteno.
 Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
 Ju pli da kunlaboraĵoj, des pli varia kaj interesa revuo !
 La artikoloj estu prefere klare tajpitaj.

B.E.F. - ESTRARO

Prezidanto : Marc DEMONTY (Bruselo)
 Vicprezidantoj : Lambertine DREZE (Lieĝo),
 Edward SYMSENS (Kalmthout)
 Sekretarioj : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo),
 Clément THOLET (Lieĝo),
 Jan BOVENDEERD (Mortsel)
 Kasisto : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno).

KUNSIDO DE LA ADMINISTRANTARO DE LA BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
JE LA 26a DE JUNIO 1982 - PROTOKOLO

La prezidanto Marc Demonty konvokis tiun kunvenon por ekzameni plurajn aferojn rilatajn al la komuna agado de la esperantistaj asocioj en Belgio.

La Ĝenerala sekretario André Mertens Goossens invitis la administrantojn en sia domo. Kial la vetero bonis, amikeca antaŭkunveno okazis sub la favoraj radioj de la (Dilbeka) suno.

- la kunveno mem komencis je la 15a horo
- ĉeestis : Marc Demonty, Lambertine Dreze, André Mertens Goossens, Jan Bovendeerd, Jules Verstraeten, Andrée Orsolini, Monique Vereecken, Roger De Schepper kaj Simone Fichet.
- petis senkulpigon : Paul Denoël, Edward Symoens, Clément Tholet, Grégoire Maertens, Wil De Smet kaj Emile Laduron.
- M.D. bovenigas kaj dankas ĉiujn, kaj enkondukas la kunsidon.

1. Financa situacio

La kasisto J.V. donas al la ĉeestantoj ekzempleron de la stato de aktiveco ĝis la komenco de junio 1982. Li klarigas kelkajn punktojn pri la enspezoj, i.a. la ŝtatoj subvencioj kiujn B.E.F. ricevas por A.P.E. kaj E.E.C., kaj pri la elspezoj, i.a., la administraj, oficejaj kaj salajraj kostoj de E.E.C.

La Ĝenerala sekretario A. M.G. legas parton de letero de W.D.S. kiu prezentas demandon pri la disdivido de la gajno de la U.K.

R.D.S. opinias ke la kongresaj reguloj fiksas la disdividon inter U.E.A., la landa asocio (BEF) kaj la loka(j) organizo(j). La sekretario petos ekzempleron de tiuj reguloj. Oni demandos aŭkaŭ la financan konsilanton G.M.

2. Federacia Kongreso

Ci-jare BEF eble ne klopodos organizi tian kongreson pro la U.K.. Ĝi tamen en 1983 povus okazi en Flandrio, eventuale kiel Beneluxa Kongreso.

3. Nova kongresperanto

Ĉar neniu kandidatiĝis por tiu laboro, estas provizore decidite doni la adreson kaj la postĉekkonton de B.E.F., ĝis alia persono plenumas la taskon. U.E.A. estos informita.

La prezidanto dankas Finon Orsolini pro ŝia laboro.

4. Reeldono de propagandiloj nacilingvaj

El klarigoj de la ĉefdelegitino A.D. kaj de la sekretario J.B., oni povas konkludi ke, same kiel FEL kunlaboras tiurilate kun N.E.A. (Nederlande), APE povas sisteme kunlabori kun U.F.E. (Francio).

5. Lasta Prepara de la 67a Universala Kongreso

J.B. komunikas la situacion de la listo de kunlaborantoj. Li atendas ankoraŭ ĉirkaŭ dudek pliajn volontulojn. M.D. pritraktas la ĉeeston kaj parolajn intervenojn de reprezentantoj de BEF, kiel respondeca landa asocio, ĉe la Universala Kongreso.

6. Kunlaboro kun la komisiono pri landa agado de U.E.A.

Laŭ J.B. la planado estas reviziota surbaze de proponoj de E.S. kiu partoprenis al tiu komisiono en Antverpeno.

7. Planoj koncerne la centjara jubileo de Esperanto

J.B. proponas prokrasti decidojn post la U.K.

8. Agado kaj labordisdivido

J.B. lanĉas interesajn ideojn pri la rolo de BEF sur nacia kampo : ĝia celo estas la gvidado kaj la subtenado de la membraj asocioj. Inter ĝiaj taskoj estas la formado de la gvidantoj, ekz. per la organizo de kadrokursoj.

La sperto kaj la dokumentado de F.E.L. disponeblas kaj helpas.

BEF devus pli aktive labori en sektoroj.

Povus ekesti unu landa revuo esperantlingva kun rubrikaj de la diversaj sektoroj. Tio permesos malpliigon de la kostoj kaj plibonigon de la kvalito de la esperantista informado.

Estus ankaŭ interese disponi pri unu jarraporto en la naciaj lingvoj pri la ĝenerala agado en Belgio.

9. Konkludo

M.D. invitas la estraranojn pripensi la proponitajn ideojn kaj dankas la ĉeestantojn por ilia bona kunlaboro.

A.M.G.

Persona rimarko de la prezidanto

Tiu kunveno certe estis pozitiva kaj fruktodona dank'al bona etoso en la familia domo de ĝesinjoroj Mertens Goossens.

M.D.

5-a INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCIOJ

Rezolucio

La 5-a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Sciencioj, okazinta en Antverpeno (Belgio) je la 23-a de julio 1982, kun partopreno de sciencistoj el 9 landoj kaj temanta pri

"La lingvoj de resumo de sciencaj tekstoj"

- konstatas, ke mankas iu kohera internacia konduto rilate al resumo kaj ke multaj revuoj ne citas la linvojn en kiuj resumo estas akceptataj,
- konstatas, ke iuj lingvoj havas privilegian rolon en resumo, sed ke tio ne komplete kontentigas la bezonojn de la ĉiam internacie kreskanta sciencistaro,
- konstatas, ke en kelkaj kampoj, kaj speciale en la kampo de kibernetiko, la internacia lingvo Esperanto jam pli kaj pli ofte estas aplikata jen en internaciaj konferencoj kaj jen en resumo,
- rekomendas, ke resumo en Esperanto estu aldonataj en kiel eble plej multaj kazoj,
- rekomendas, ke sciencistoj kiuj scipovas Esperanton, aldonu resumon en tiu lingvo al ĉiu teksto kiun ili redaktas kaj, se necese, aparte motivigu tion,
- rekomendas, ke kreskanta nombro da revuoj estu preta akcepti tiajn resumojn.

x x x x x
x x x
x

Komisio pri la
Internaciaj Konferencoj pri la
Lingva Problemo en la Sciencioj
Sekretario: D-ro W. M. A. De Smet
Hertendreef 12
B-2180 Kalmthout

67A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ANTVERPENO, 82 07 24 - 31

1899 Esperantistoj el precize 50 landoj aliĝis al la ĉi-jara kongreso en Antverpeno en kies Zoologia Ĝardeno troviĝis la kongresejo. La kongresanoj havis la rajton iri en la zoologian Ĝardenon senpage dum la tuta semajno, kio kreis tre agrablajn, malstreĉajn etoson dum la mildaj, krepuskaj horoj de la Interkona Vespero. Bela, varma vetero dum la cetero de la semajno faris sian specialan kontribuon.

Kvankam oni kutime supozas, ke urba zoologia Ĝardeno devas esti lokita ĉe la rando de la urbo, tiu de Antverpeno ne povus esti pli kontraŭ ĝin flankas la Centra Stacidomo eĉ! De tio rezultigis, ke estis aparte simple kaj agrable vagi el la kongresejo rekte en la centron de la urbo kie - precipe dum la nokto - amaso da reatoracioj, trinkejoj, dancejoj kaj la centraj butikoj kaj magazenoj povis distri la eksterlandajn vizitantojn. Tiucele, la Loka Kongresa Komitato, kun la kunlaboro de la Grafika Centro de UEA (kiu situas en Antverpeno), estis preparinta por la kongresa dokumentaro plurajn ampleksajn broŝurojn kaj gvidlibretojn pri la diversaj vizitindaj ejoj kaj kvartaloj.

Por dumtaga distrado, IKK ankaŭ certigis, ke ne mankis interesaj, eksterkongresejaj eroj. De la lundo ĝis la vendredo estis eble elekti el 20 malsamaj ekskursoj; malgraŭ tiom nekutime granda elekto la kongresaj turistoj alfluis entuziasme al la aŭtobusoj, trajnoj kaj ŝipoj kaj aĉetis entute 2000 ekseskurbiletojn.

Simile riĉa estis la kultura enhavo de la kongreso, kiu enkadrigis artan festivaletan. Venis al ĝi pupteatristoj el Hungarujo kaj Hinda Unio, du dramgrupoj el Francujo kaj po unu el Hungarujo kaj Jugoslavujo; tiaj, plus kabaredo el Francujo, prezentigis en la speciale luita provinca teatro, kiu provizis bonegan renkontejon por kaj aktoroj kaj spektantoj. Krome, en la kongresejo, la Nacia Vespero arigis plurajn multtalentajn lokajn artistojn kaj la Internacia Muzika Vespero arigis altkvalitajn artistojn el la tuta mondo. Ĉu pli ol tio? Jes certe! Orgenkonzerto en la katedralo, kariljona-konzerto en ĝia turo por la aŭskultantoj sur la belega, pitoreska placo sube, nacia kaj internacia ĥoroj kaj diversaj intervalaj muzikistoj kaj kanzonistoj.

Kun tiom da eroj en la programo, kelkaj ŝanĝoj estis, kiel kutime, neeviteblaj (kvankam vere malmultaj). Por diskonigi tiajn aktualajn novaĵojn, la kongreso disponis pri verŝajne la plej alloga Kongresa Kuriero iam aperinta. Dank' al iniciato de "Heroldo de Esperanto", aperis akurate kvin fojojn tiu ĵurnalo kombinita kun la Kongresa Kuriero. Ĝi fidele atendis la plej fruajn kongres-

anojn ĉe la enirejo, estis bonege presita sur altkvalita papero, eldoniĝis en plene adekvata kvanto kaj kostis... nenion!

Legindaĵoj ankaŭ ne mankis en la kongresa Libro-Servo, kiu disponis pri riĉa sortimento de plej freŝaj eldonaĵoj en Esperanto. Kolektantoj de esperantaĵoj povis rikolti ankaŭ ĉe la filatela budo kaj la aŭkcio, kaj lokaj Esperantistoj povas fieri pri la granda amasmedia interesiĝo pri la kongreso, kiu liveris ampleksan kolekton de gazetaltranĉaĵoj al la afiŝtabuloj; krome estis multaj radio- kaj televidintervjuoj kaj raportoj.

Semtempe kun la UK okazis la 19-a Infana Kongreseto, kiu en la fino de la semajno povis prezenti al la kongresanaro dum la Fermo 31 infanojn el 10 landoj. Ambaŭ pupteatraĵoj vizitis la infanan kongresejon; la deĵorantaro inkluzivis nebelgajn kunlaborantojn; kaj oni aparte laŭdis la altan kvaliton de la loĝigo kaj manĝoj.

Kelkaj ciferoj pri la 67-a UK:

1899 kongresanoj el 50 landoj
31 infanoj el 10 landoj en la IK
166 programeroj kaj 20 ekskursoj
800 bildoj faritaj de la Foto-Servo
Abunda dokumentaro disponigita al la kongresanaro inkluzivis:
- 48-paĝan Duan Multenon
- 48-paĝan Informbroŝuron pri kie manĝi kaj trinki en Antverpeno
- 112-paĝan Kongresan Libron kun suplementa 8-paĝa kajero pri la Arta Programo
- ampleksajn skribajn klarigojn pri la vizitataj lokoj por ekskurstantoj; ĉiuj kongresanoj aŭtomate ricevis plurajn kolorajn turismajn faldfoliojn
10 IKU-prelegoj fare de fakuloj el 9 malsamaj landoj

ESPERANTISTOJ EN BANNEUX (BELGIO)

Kiel ĉiujare ekde 1976, la esperantistoj de diversaj naciecoj kaj landoj vizitis la Virgulinon de la nacioj. La ĉefa temo de renkontiĝo estis "la Virgolino kaj la paco". Oni reprecizigis ke la paĉo ne nur konsistas en la neĉesto de milito sed precipe en la disvolviĝo de ĉiuj homaj kaj kristanaj valoroj de l'homaro. La motivo de nia agado ne estas nur la prizorgo de la justeco sed la amo al niaj gefratoj. Tiu amo estas la esenca bazo de la paco. La fonto de la amo estas la koro de la patrinoj. Do ni ĝuste elektis la celon de nia pilgrimado veninte preĝi la Dipatrinon de ĉiuj homoj.

Komence de la posttagmezo, ni publike preĝis la rozarion, Mar-Sante tra la mariana arbaro. La du sacerdotoj kuncelebris la Eukaristion en la kapelo de Maria Perantino, je la intenco de Pollando. Dum la meso estis proponita al ĉiu ĉeestanta membro renovigi por si mem la oficialan konsekriĝon de nia movado al la senmakula koro de Maria.

Unue la kapelano oficiale prezentis al la multnombraj partoprenantoj la esperantan grupon. Poste la alvokoj estis esprimitaj en diversaj lingvoj inklusive Esperanto, antaŭ vasta publiko, kion oni oficiale prezentis la esperantan grupon. Kaj dum tiu ceremonio estis ankaŭ videbla ĉe altaro ŝildo: "Esperanto, lingvo por ĉiuj popoloj".

Pastroj L. Bourdon kaj L. Muller.

LIONTANO '82

La kvina semajnfino, ĉifoje kvartage, kun tri noktaduraj dansvesperoj, du elstaraj kuirejoj normala kaj vegetara kaj unu ĉina partoprenanto. Dai en Song sanigis la okcidentan parton de la mondo per siaj profundaj klarigoj pri tradiciaj ĉinaj gimnastikekzercoj. Post longa cerbur- kaj praktikado pri fastado, dietoj kaj vegetara nutraĵo montriĝis ke ĉiuj plenigu sian stomakon por survivi. Tiel ni kore dankas la kuirteamon. Piedtiraĵo pruvigis ege interese sed fiudara, dum akupunkturaj kaj akupresuraj eksperimentoj estis pli pikantaj. Sukurado ne estis bezonata, sed tamen laŭdata pro ĝiaj streĉoj por instrui la helpadon se tio necesus. Dentistinoj oni ankaŭ ne bezonis sed en intima rondo ŝi klarigis sekretojn por konservi la dentaron. Komencantoj, progresantoj en la internacia lingvo Esperanto kaj eksterlandanaj nekomprenejoj de la nederlanda lingvo sekvis multnombro la altnivelajn kursojn. Surpriza okazintaĵo estis la subita apero de nederlanda trupo. Ili prezentis "La Krio", amuza kaj distra teatraĵo pri geedza malkonsento. Oni semajnfinis en arbora ĉirkaŭaĵo sed ĉiuj ekdormis nevidinte la belecon de la naturaj kreskaĵoj pro troiga interesiĝo pri la programeroj. Multe da entuziasmuloj venis al la stildanca salono por sinĝeti en valsojn kaj tiel plu. Kelkaj tre bone kvikstepon scipovis. Ankaŭ la popoldancado lacigis amasojn da kruroj. Tamen retrospektive, la plej populara dancmaniero estis bamba. La duono de la partoprenantoj bedaŭrinde suferis la sekvon de la fina rezolucio de la laborgrupo eŭtanasia: forigu de ĉiuj krokodilantoj. Por tio ne dubas pri la organizeblecoj de eventuala sekvonta semajnfino. Se tamen novaj purrasaj animoj sin prezentos vi denove estos invitatataj venontjare! Ĝis!

Jo Vermuyten
Leen Peeters
Erika Van Gerecht
Dirk De Weerd
André Staes

"Europe 2000" /19, rue Lasbroussart, 1050 Bruxelles/ estas ariĝo de eŭropaj asocioj, kiuj antaŭvidas Eŭropon konstruitan laŭ federo, ne de ŝtatoj, sed de etnaj regionoj, t.e. laŭ la lingvo kaj la kulturo.

Partoprenis tiun kunvenon trideko da personoj, ĉefe el Belgio, Francio, Germanio kaj Italio. Prezidis S-ro Y. Peeters, belga ano de la Eŭropa Parlamento; ankaŭ du aliaj eŭro-parlamentanoj parte ĉeestis kaj alparolis la kongreson.

S-anoj De Bloudts, Pirlot kaj Van Damme ĉeestis.

La 22-an de oktobro, S-ro Van Damme jam povis mallonge substreki la lingvan problemon en la interetna komunikado.

La 23-an, S-anoj Pirlot kaj Van Damme proponis rezolucion, kiun la kongreso aprobis post vigla diskutado. Ĝi jene tekstas :

Le "Congrès Europa 2000" :

- conscient de l'importance de la langue comme élément de cohésion et de communication pour une intégration harmonieuse des ethnies européennes;

- soucieux d'éviter une discrimination arbitraire dans les contacts interethniques;

- recommande la création d'une commission représentative pour étudier sous tous ses aspects le problème de la communication interethnique en Europe, y compris la solution éventuelle d'une langue internationale neutre planifiée.

Ni aliiru ke ankaŭ reprezentanto de "Interlingua" rajtis demokrate alparoli la ĉeestantaron kaj proponi sian lingvon kiel interetnan komunikilon.

Konkludoj :

1. Eĉ se la debatoj ne ĉiam estis interesaj, nepre ni havu reprezentantojn en tiaj medioj. Eŭropo konstruiĝos ne nur je la pinto (Eŭropa Parlamento), sed ankaŭ je la bazo (diversaj eŭropaj asocioj), kiu povos iĝi grava pregrupo.
2. Ni estu tre singardaj kaj ne tro altrudu niajn ideojn; tiuj medioj ne estas maturaj por tuj akcepti la ideon de Esperanto. Multaj Eŭropistoj eĉ ne konscias pri la graveco de lingva diskriminado en la nuntempa interetna komunikado.
3. Se la E-istoj, ĝis nun tre (tro) klubemaj, ne ĉeestos tiajn internaciajn kunvenojn, ili preterlasos bonegajn okazojn, kiujn aliaj povos kapti. Tiu ĉeesto de reprezentanto de "Interlingua" estas taŭga pruvo pri la danĝero de neĉeesto.
4. Necesus ke, ekzemple Eŭropa Esperanto-Centro, pretigu konsilaron kiu celas tiujn, kiuj intencas agadi en neoficialaj eŭrop-medioj.

Laŭ rotacia sistemo, post la du ĝeneralaj ĉefkunsidejoj de BEF en Lieĝo (1980) kaj Bruselo (1981), ĉi-jara kunsido okazis en Antverpeno, en la Esperanto Domo, je sabato 6-a de novembro.

La protokolo aperos en venonta bulteno.

La sekretarioj de la membraj asocioj bonvolu sendi ekzempleron de sia jarraporto al la ĝenerala sekretario de B.E.F. (Pluraj jam faris tion, kaj A.M.G. dankas ilin).

A.M.G.

GOJIGA NOVAĜO POR B.E.F.

Iom post iom ni transiras al la jarfina periodo.

Tio ne nur anoncas la komenciĝon de la vintra sezono sed ankaŭ la repaĝon de la kotizoj por la jaro 1983.

Gojiga novaĝo estas ke BEF denove ricevis de la Impostaj Servoj la permeson por la donacantoj al BEF (minima sumo de 1200 F : povas esti pli !) subtrahi tiun sumon de ilia impostdeklaracio por 1983 se la donacoj okazos antaŭ 31-12-82 !

Por tiuj donacintoj BEF volas fari geston ,

Rekomence BEF oferas :

- Aliĝon al Asocio por Esperanto (A.P.E.) aŭ al Flandra Esperanto-Ligo (F.E.L.), kiu inkluzivas la membrecon de la grupo al kiu li aŭ ŝi apartenas
- La Jarlibron 1983 de UEA (kun rajto je reduktita kotizo por la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto dum 1983)
- Abonon por 1983 je revuo "Esperanto" de UEA.
- Abonon je la naciaj revuoj "Esperanto en marche" aŭ "Esperanto Panorama".

Ĉar en la nuna tempo BEF bezonas multan financan subtenon por alfronti la problemojn kiuj ĉiam pli kaj pli ampleksiĝas pro la kriza situacio kiun travivas la tuta mondo, ni fidus je la bona volo de niaj belgaj esperantistoj por kunhelpi al la daŭriga bonfarto de Belga Esperanto-Federacio !

La donacantoj bonvolu uzi la pĉk 000-0163434-86 de Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b 24, B-1040 Bruselo menckante nur la indikon "DONACO" (kaj nenion pli).

Kun anticipa danko ni atendas viglan reagon !

Bonvolu ne forgesi ke ni bezonas vian daŭran helpon por ke Esperanto plu progresu !

J.V.

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

DE LA 30a DE JULIO ĜIS LA 6a DE AUGUSTO 1983

EN BUDAPEŬTO, HUNGARIO

La Unua Oficiala Bulteno anoncis ke

1. vi povas ricevi aliĝilon ĉe via landa peranto
2. vi prefere resendu la aliĝilon kaj faru la pagon al via landa peranto.

Ĉble vi jam ricevus aliĝilon. Ĝi estis ankau aldonita al la oktobra numero de la revuo "Esperanto".

Por Belgio, la landa peranto estas B.E.F., kies adreso kaj konto estas indikitaj ĉe la unua paĝo de tiu- ĉi bulteno.

Laŭ la hodiaŭa kurzo de la guldeno en Belgio (18,38 BF), vi trovos ĉisube la kongreskotizojn en belgaj frankoj :

Kongreskotizoj validaj ĝis la dato:	1982. 12. 31.	1983. 03. 31.
1. Kongresano ne membro individua de UEA	3.455 BF	3.805 BF
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro	2.995 "	3.345 "
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo	2.297 "	2.647 "
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1	2.408 "	2.665 "
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3.	2.095 "	2.352 "
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	1.030 "	1.140 "
7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	1.728 "	1.912 "
8. Blindulo	1.379 "	1.525 "

Pro la variebleco de la kurzoj, la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).

Por eviti malgajnojn por la peranto, la aliĝintoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por B.E.F.

A.M.G.

Via uea-kodo (se vi konas):



ALIĜILO BUDAPEŬTO

68a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, Hungario

Kongresnumero
Dato de ricevo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Postĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627 337 (nederlanda), aŭ Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444.

LKK: Budapest, Pf. 193, H-1368, Hungario, Bankkonto: OTP VIII. ker. 516-10005

<input type="checkbox"/> Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas la pagon laŭ la apuda specifo al: per poŝtmandato (poŝta ĝiro) / banka ĝiro / banka ĉeko * <input type="checkbox"/> Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.	Kotizo (en kategorio...) Adopta Kaso Blindula Kaso Literatura Kaso Adoptaj Gepatroj Bankkostoj Entute
--	--

Viro/Virino Profesio-fako (medevige, por apertigi en Kongresa Libro)

Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeto ordigo)

Nomo (kompleta)

Kompleta poŝta adreso: naskilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita

.....

Lando (en Esperanto)

Naskiĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj)

Nomo de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo)

Dato de tiu ĉi aliĝilo Subskribo

Por uzo de la administracio

UEA-membro: kotizo de		ricevita por la jaro		
Konfirmo de la C. O.:		Konfirmo de peranto:		
Pago ricevita	Konfirmulo sendita	Statistikita	2a Bulteno sendita	Kongreslibro sendita

* Forstrekite la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 6 gld. pro la bankkostoj.

Kongreskotizoj validaj ĝis la dato:	1982. 12. 31.	1983. 03. 31.	1983. 06. 18.
1. Kongresano ne membro individua de UEA	gld for-oj 188 2474	gld for-oj 207 2724	gld for-oj 226 2974
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro	163 2145	182 2395	201 2645
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo	125 1645	144 1895	163 2145
4. Edziĝinto de kongresano en kategorio 1	131 1724	145 1908	158 2079
5. Edziĝinto de kongresano en kategorio 2 aŭ 3.	114 1500	128 1684	141 1856
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . .	56 737	62 816	68 895
7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	94 1237	104 1370	113 1487
8. Blindulo	75 987	83 1092	91 1198

Post la 18a de junio 1983 aliĝoj ne plu estos akceptataj, se tamen, la aliĝantoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la lasta periodo plus krompago 40 gld.

- La kongreskotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon. Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno aperonta en februaro. Frua aliĝo helpas la aliĝanton ĝustatempe fari siajn mendojn de la Kongreso.
- Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
- La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝanto poste ne partoprenas la Kongreson. Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
- Kongresaliĝo ne estas transdonebla al alia persono.
- Kongresano en kategorio 1 (nemembro de UEA) ricevas la revuon „Esperanto“ dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
- Kongresano en kategorio 2 aŭ 3 devas pagi la membrototizon de UEA antaŭ aŭ samtempe kun la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
- Kongresano en kategorio 6 devas indiki sian naskigdaton.
- Kongresano en kategorio 7 devas indiki sian naskigdaton kaj sendi kun via aliĝilo oficialan ateston pri via studenteco.
- Kongresano en kategorio 8 devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizaĵo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝanta aŭ samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
- Infano malpli ol 13-jara rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
- Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ samformatan paperon. Skribu klare – tipe aŭ preslitere.
- Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco – prefere al via landa kongresa peranto, se tia markas – al Rotterdamo.
Aliĝantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetio kontaktu sian landan asocion, el Romano turnu sin al L.K.K.
- Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigarditaj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi raj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.